

Karlo Markso

**Kontribuaĵo al la kritiko
de la hegela jurfilozofio.
Enkonduko**

**Kontribuaĵo al la kritiko
de la politika ekonomio.
Antaŭparolo**

Kun teksto de Jozefo Ŝlejŝtejno

Karlo Markso

**Kontribuaĵo al la kritiko de la
hegela jurfilozofio.
Enkonduko;**

**Kontribuaĵo al la kritiko de la
politika ekonomio.
Antaŭparolo**

**Kun teksto de
Jozefo Ŝlejfŝtejno**

Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

Karlo Markso:
Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio.
Enkonduko;
Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio.
Antaŭparolo.
Kun teksto de Jozefo Ŝlejŝtejno
Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
2010
ISBN 978-2-918300-38-0

Enhavo

Karlo Markso	
Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio.	
Enkonduko.....	6
Jozefo Ŝlejŝtejno	
pri tiu ĉi verko de Markso.....	23
Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio	
Antaŭparolo.....	31

Karlo Markso

Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko

*Tradukita laŭ Karl Marx/Friedrich Engels: Werke [MEW],
(Karl) Dietz Verlag, Berlino, Volumo 1, Berlino (GDR), 1976,
p. 378-391
en la reta versio, de 1999-08-30
http://www.mlwerke.de/me/me01/me01_378.htm*

Verkita fine de 1843 ĝis januaro 1844

*„Deutsch-Französische Jahrbücher [Germanaj-francaj
jarlibroj]”, Parizo, 1844*

Por Germanio la *kritiko de la religio* estas esence finita, kaj la kritiko de la religio estas la premiso de ĉia kritiko.

La *profana* ekzisto de la eraro estas kompromitita, kiam ĝia *ĉiela preĝo por altaro kaj hejmo* estas refutita. La homo, kiu en la fantasta realeco de la ĉielo, kie li serĉis superhomon, trovis nur la reflekon de si mim, jam ne emos trovi nur la reflekon de si mem, nur la nehomon, tie kie li serĉas kaj devas serĉi sian realecon.

La fundamento de la nereligia kritiko estas: *La homo faras la religion*, la religio ne faras la homon. Kaj pli precize, la religio estas la memkonscio kaj la memsento de la homo, kiu aŭ ankoraŭ ne akiris sin mem, aŭ jam perdis sin. Sed *la homo*, tio ne estas abstrakta estaĵo troviĝanta ekster la mondo. La homo, tio estas *la mondo de la homo*, ŝtato, socio. Tiu ŝtato, tiu socio produktas la religion, *inversigitan¹ mondkonscion*, ĉar ili estas *inversigita mondo*. La religio estas la ĝenerala teorio de tiu mondo, ĝia enciklopedia kompendio, ĝia logiko en populara formo, ĝia spiritualisma honorpunkto, ĝia entuziasmo, ĝia morala sankcio, ĝia sole-

1 En la originalo: „verkehrtes”, t.e. inversigita, sed ankaŭ: malĝusta, falsa. -vl

na kompletigo, ĝia ĝenerala bazo de konsolo kaj praviĝo. Ĝi estas la *fantasta realigo* de la homa esenco, ĉar la homa esenco ne posedas veran realon. La batalo kontraŭ la religio estas do malrekte la batalo kontraŭ tiu mondo, kies spirita aromo estas la religio.

La *religia* mizero estas samtempe la *esprimo* de la reala mizero kaj samtempe la *protesto* kontraŭ la reala mizero. La religio estas la suspiro de la premata kreaĵo, la animo de senkora mondo, kiel ĝi estas la spirito de senspiritaj situacioj. Ĝi estas la *opio* de la popolo.

La nuligo de la religio kiel la *iluzia* feliĉo de la popolo estas la postulo de ĝia *real*a feliĉo. La postulo forlasi la iluziojn pri situacio estas la *postulo forlasi situacion kiu bezonas iluziojn*. La kritiko de la religio estas do *ĝerme la kritiko de la lamentejo*, kies *glorkrono* estas la religio.

La kritiko displukis la imagajn florojn kiuj kovris la katenon, ne por ke la homo portu la senfantazian, senkonsolan katenon, sed por ke li deĵetu la katenon kaj pluku la vivantan floron. La kritiko de la religio seniluziigas la homon, por ke li pensu, agu, formu sian realon kiel seniluziiginta homo akirinta la racion, por ke li moviĝu ĉirkaŭ si mem kaj per tio ĉirkaŭ sia reala suno. La religio estas nur la iluzia suno, kiu moviĝas ĉirkaŭ la homo, tiom longe kiom li ne movas sin ĉirkaŭ si mem.

Estas do la *tasko de la historio*, post kiam la *Ĉielo de la vero* malaperis, establi la *veron de la surtera vivo*. Estas unue la *tasko de la filozofio*, kiu staras en la servo de la historio, post kiam la *sankta formo* de la homa memfremdiĝo estas senmaskigita, senmaskigi la memfremdiĝon en ĝiaj *nesanktaj formoj*. La kritiko de la Ĉielo per tio transformiĝas en la kritikon de la Tero, la *kritiko de la religio* en la *kritikon de la juro*, la *kritiko de la teologio* en la *kritikon de la politiko*.

La sekvanta argumentado – kontribuaĵo al tiu laboro – pritraktas unue ne la originalon, sed kopion, la germanan ŝtat- kaj jur-*filozofion*, pro nenia alia kialo ol ĉar ĝi traktas pri *Germanio*.

Se oni volus pritrakti la germanan *aktualan staton*, eĉ se en la sole konvena maniero, do negative, la rezulto tamen restus *anakronismo*. Eĉ la neado de nia politika estanteco troviĝas jam kiel polvokovrita fakto en la historia formetejo de la modernaj popoloj. Se mi neas la pudritajn harplektaĵojn, mi tamen havas daŭre la nepudritajn harplektaĵojn. Se mi neas la germanajn kondiĉojn de 1843, mi staras, laŭ franca tempkalkulo, apenaŭ en la jaro 1789, kaj eĉ malpli en la fokuso de la nuntempo.

Ja, la germana historio flatas sin je movado, kiun neniuj alia popolo en la historia sfero antaŭe faris nek poste imitos. Nome, ni dividis la restaŭradojn de la modernaj popoloj, sen dividi iliajn revoluciojn. Ni estis restaŭritaj, unue, ĉar aliaj popoloj kuraĝis revolucion, kaj due, ĉar aliaj popoloj suferis kontraŭrevolucion, jen ĉar niaj sinjoroj timis, jen ĉar niaj sinjoroj ne timis. Ni, kun niaj ŝafistoj ĉe la pinto, troviĝis ĉiam nur unufoje en societo de la libereco, en la *tago de ĝia enterigo*.

Skolo, kiu pravigas la fiaĵon de hodiaŭ per la fiaĵo de hieraŭ, skolo, kiu deklaras ribela ĉiun kriegon de la servutulo kontraŭ la vipo, se la vipo estas multjara, heredita, historia vipo, skolo, kiu montras la historion, kiel la Dio de Izraelo al sia servisto Moseo, nur sian postaĵon, la *historia jurskolo*, do inventus la germanan historion, se ĝi ne estus invento de la germana historio. Kiel Ŝajlok, sed Ŝajlok kia servisto, ĝi ĵuras ricevi ĉian funton da karno, tranĉita el la koro de la popolo, laŭ sia kupono, laŭ sia historia kupono, laŭ sia kristana-germana kupono.

Bonkoraj entuziasmoj male, germanaj naciistoj pro temperamento kaj liberpensuloj pro penso, serĉas nian

historion de libereco transe de nia historio en la ĝermanaj praarbaroj. Sed en kio nia historio de libereco distingiĝas de la liberec-historio de la apro, se ĝi troveblas nur en la arbaroj? Krome estas konate: Kiel oni krias en la arbaron, tiel ĝi elsonas el la arbaro. Do, pacon al la ĝermanaj praarbaroj!

Militon al la germanaj kondiĉoj! Jes ja! Ili estas *sub la nivelo de la historio*, ili estas sub ĉia kritiko, sed ili restas objekto de la kritiko, kiel la krimulo, kiu staras sub la nivelo de la humaneco, restas objekto de la *ekzekutisto*. En batalo kun ili, la kritiko ne estas pasio de la kapo, ĝi estas la kapo de la pasio. Ĝi ne estas anatomia tranĉilo, ĝi estas armilo. Ĝia objekto estas ĝia *malamiko*, kiun ĝi volas ne refuti, sed neniigi. Ĉar la spirito de tiuj kondiĉoj estas refutita. Per si mem ili ne estas *pensindaj* objektoj, sed io same malestiminda kiel malestimata. La kritiko por si mem ne bezonas memkompreniĝon pri tiu objekto, ĉar ĝi jam plenumis tion. Ĝi agas jam ne kiel *absoluta celo*, sed jam nur kiel *rimedo*. Ĝia esenca patoso estas la *indigno*, ĝia esenca laboro la *denunco*.

Necesas priskribi reciprokan obtuzan premon de ĉiuj sociaj sferoj unu al la alia, ĝeneralan senfaran misagordon, limigitecon same sin agnoskantan kiel sin miskonantan, tenatan en la kadro de regsistemo, kiu, vivanta per la konservado de ĉiaj misoj, estas mem nenio alia ol la *reganta miseco*.

Kia spektaklo! La senfine daŭranta divido de la socio en la plej diversajn rasojn, kiuj staras unu fronte al la alia kun etaj malsimpatioj, malbona konscienco kaj brutala mezkvalito, kiujestas, ĝuste pro sia reciproka ambigua kaj suspekt-ema pozicio, kvankam kun diversaj formalajoj, sendistinge traktataj de siaj *mastroj*, kiel *koncesiitoj*. Kaj eĉ tion, ke ili estas *dominataj*, *regataj*, *posedataj*, ili devas agnoski kiel *koncesion de la ĉielo* kaj konfesi! Kaj aliflanke jen tiuj

suverenoj mem, kies grandeco estas en inversa proporcio al sia nombro!

La kritiko, kiu pritraktas tiun enhavon, estas la kritiko en interbatiĝo, kaj en interbatiĝo la celo ne estas scii, ĉu la kontraŭulo estas nobla, samranga, *interesa* kontraŭulo, sed *trafi* lin. Temas pri tio, lasi al la germanoj eĉ ne momenton da memtrompo kaj da rezignacio. Oni devas fari la realan premon ankoraŭ pli prema, per tio ke oni aldonas al ĝi la konscion de la premo, fari la honton ankoraŭ pli honta, per tio ke oni publikigas ĝin. Oni devas priskribi ĉiun sferon de la germana socio kiel la hontmakulon de la germana socio, oni devas tiujn ŝtoniĝintajn kondiĉojn dancigi per tio, ke oni antaŭkantas al ili ilian propran melodion! Oni devas instrui la popolon *ektimi* sin mem, por *kuraĝigi* ĝin. Oni plenumas per tio nerefuzeblan bezonon de la germana popolo, kaj la bezonoj de la popoloj estas lastanalize la lastaj kialoj de ilia kontentigo.

Kaj eĉ por la *modernaj* popoloj tiu batalo kontraŭ la mensbarita enhavo de la germana *nuna stato* ne povas esti seninteresa, ĉar la germana *nuna stato* estas la *malkaŝa perfektigo de la malnova reĝimo*², kaj la *malnova reĝimo* estas la *kaŝita manko de la moderna ŝtato*. La batalo kontraŭ la germana politika estanteco estas la batalo kontraŭ la pasinteco de la modernaj popoloj, kaj tiuj estas daŭre ĝenataj de la rememoroj de tiu pasinteco. Estas por ili instrue, vidi ke la malnova reĝimo, kiu spertis ĉe ili sian tragedion, kiel germana reaperanto ludas *komedion*. Ĝia historio estis tragedia, tiom longe kiom ĝi estis la antaŭekzistanta potenco de la mondo, kaj la libereco, male, persona incidento, per unu vorto, tiom longe kiom ĝi kredis mem, kaj devis kredi, je sia rajto. Tiom longe, kiom la *malnova reĝimo* batalis kiel ekzistanta mondordo kontraŭ nur estiĝanta mondo, ĉe ĝia flanko estis mondhistoria eraro, sed ne persona eraro. Ĝia pereado estis do tragedia.

2 En la originalo france (*ancien régime*). -vl

La nuna germana reĝimo, male, anakronismo, evidenta kontraŭdiro kontraŭ ĝenerale agnoskataj aksiomoj, la publike al la mondo elmontrata nenieco de la *malnova reĝimo*, jam nur iluziigās kredi je si mem, kaj postulas de la mondo la saman iluziigon. Se ĝi kredus je sia propra *esenco*, ĉu ĝi kaŝus ĝin sub la *ŝajno* de fremda esenco kaj serĉus sian savon en hipokriteco kaj sofismo? La moderna *malnova reĝimo* estas jam nur la komedianto de monddordo, kies *veraj herooj* mortis. La historio estas ĝisfundema kaj trairas multajn fazojn, kiam ĝi entombigas malnovan formon. La lasta fazo de mondhistoria formo estas ĝia *komedio*. La dioj de Grekio, kiuj estis jam tragike vunditaj, en la „Katenita Prometeo” de Eŝilo, devis ankoraŭ komike morti en la dialogoj de Lukiano. Kial tia irado de la historio? Por ke la homoj disiĝu *ĝoje* de sia pasinteco. Tiun *ĝojan* historian destinon ni postulas por la politikaj potencoj de Germanio.

Sed ekde kiam la moderna politika-socia realeco estas mem submetita al la kritiko, ekde kiam do la kritiko leviĝas al vere homaj problemoj, ĝi troviĝas ekster la germana nuna stato, alie ĝi pritraktus sian objekton *sub* ties nivelo. Jen ekzemplo! La rilato de la industrio, entute de la mondo de riĉeco, al la politika mondo estas ĉefproblemo de la moderna tempo. En kiu formo tiu problemo komencas interesi la germanojn? En la formo de *protektdoganaĵoj*, de la *malpermesa sistemo*, de la *nacia ekonomio*. La germanumado iris el la homo en la materion, kaj tiel iun matenon niaj kotonkavaliroj kaj ferherooj vidis sin transformitaj en patriotojn. Oni komencas do en Germanio agnoski la suverenecon de la interna monopolo per tio, ke oni donas al ĝi la *suverenecon ekstere*. Oni do ekkomencas en Germanio tion, kion oni en Francio kaj Anglio ekĉesigas. La malnova putra stato, kontraŭ kiu tiuj landoj teorie ribelas kaj kiun ili ankoraŭ eltenas nur, kiel oni eltenas la katenojn, estas en Germanio salutata kiel la leviĝanta matenruĝo de bela estonteco, kiu apenaŭ kuraĝas transiri el la *ruza* teorio en

la senindulgan praktikon. Dum en Francio kaj Anglio la problemoj nomiĝas: *Politika ekonomio* aŭ *regado de la socio super la riĉeco*, ĝi nomiĝas en Germanio: *nacia ekonomio* aŭ *regado de la privata proprieto super la nacieco*. En Francio kaj Anglio oni celas do forigi la monopolon, kiu pluiris ĝis siaj lastaj konsekvencoj; oni celas en Germanio, pluri ĝis la lastaj konsekvencoj de la monopoloj. Tie temas pri la solvo, kaj ĉi ite temas ankoraŭ nur pri la kolizio. Jen sufiĉe videblas per ĉi ekzemplo de la *germana* formo de la modernaj problemoj, kiel nia historio, same kiel mallerta rekruto kiu devas postfari antaŭajn ekzercojn, havis ĝis nun nur la taskon postfari historion jam delonge banaliĝintan.

Se la *tuta* germana evoluo do ne irus trans la *politikan* germanan evoluon, tiam germano povus interveni en la problemoj de la nuntempo ne pli ol *ruso* povas interveni en ili. Sed kvankam la unuopa individuo ne estas ligita de la baroj de la nacio, la *tuta* nacio estas per tio ankoraŭ tute ne liberigita per la liberiĝo de unu individuo. La skitoj progresis eĉ ne unu paŝon al la greka kulturo per tio ke Grekio nombras skiton inter siaj filozofoj.

Bonŝance ni germanoj ne estas skitoj.

Kiel la antikvaj popoloj travivis sian prahistorion en la imago, en la *mitaro*, tiel ni germanoj travivis nian posthistorion en la penso, en la *filozofio*. Ni estas *filozofiaj* samtempuloj de la nuntempo, sen esti ties *historiaj* samtempuloj. La germana filozofio estas la *ideala longigo* de la germana historio. Kiam ni do kritikis, anstataŭ la nekompletajn verkojn de nia reala historio la postlasitajn verkojn de nia idea historio, la filozofion, nia kritiko troviĝas meze inter la demandoj, pri kiuj la nuntempo diras: *Jen la demando*³. Tio, kio ĉe la progresintaj popoloj estas praktika malkonsento pri la moderna socia ordo, tio estas en Germanio, kie tiu ordo mem ankoraŭ ne ekzistas, unue *kritika* malkonsento

3 En la originalo angle (*That is the question*). -vl

kun la filozofia respeguliĝo de tiu socia ordo.

La *germana jur- kaj ŝtat-filozofio* estas la sola germana historio samranga kun la *oficiala* moderna nuntempo. La germana popolo devas do konsideri tiun sian revhistorion kiel parton de siaj ekzistantaj kondiĉoj kaj submeti al la kritiko ne nur tiujn ekzistantajn kondiĉojn, sed samtempe ilian abstraktan daŭrigon. Ĝia estonteco ne povas *limiĝi* al la rekta neado de sia reala ŝtata kaj jura ordo nek al la rekta realigado de sia ideala ŝtata kaj jura ordo, ĉar ĝi posedas la rektan neadon de sia reala ordo en sia ideala ordo, kaj la rektan realigadon de sia ideala ordo ĝi preskaŭ jam *preterpasis* en la ideo de la najbaraj popoloj. La *praktika* politika partio en Germanio do prave postulas la negadon de la *filozofio*. Ĝia malpravo konsistas ne en la postulo, sed en la halto ĉe tiu postulo, kiun ĝi serioze nek plenumas nek povas plenumi. Ĝi kredas plenumi tiun negadon per tio ke ĝi turnas la dorson al la filozofio kaj, kun la rigardo aliloken, malbonhumore grumblas kelkajn banalajn frazojn pri ĝi. Pro la mallarĝeco de ĝia horizonto ĝi ne konsideras la filozofion kiel ankaŭ parton de la *germana* realeco aŭ kredas ĝin eĉ *sub* la germana praktiko kaj la teorioj kiuj servas ĝin. Vi postulas, ke oni eliru ĉe *realaj vivoĝermoj*, sed vi forgesas, ke la reala vivoĝermo de la germana popolo ĝis nun kreskegis nur en ĝia *cerbo*. Unuvorte: *Vi ne povas nuligi⁴ la filozofion, sen realigi ĝin.*

La saman eraron, sed kun *inversaj* faktoroj, faris la *teoria* partio, kiu datas de la filozofio.

Ĝi vidis en la nuna batalo nur la *kritikan batalon de la filozofio kontraŭ la germana mondo*, ĝi ne konsideris, ke la *ĝisnuna filozofio* mem apartenas al tiu mondo kaj estas ties, kvankam ideala, *kompletigo*. Kritika kontraŭ sia kontraŭulo, ĝi kondukis senkritike al si mem, per tio ke ĝi eliris de la

4 En la originalo: *aufheben* – aŭfhebi (hegela esprimo kiu signifas nuligi, forigi, sed samtempe konservi en nova kvalito. -vl

*hipotezoj*⁵ de la filozofio kaj restis ĉe la rezultoj de ĝi donitaj aŭ deklaris aliloke prenitajn postulojn kaj rezultojn rektaj postuloj kaj rezultoj de la filozofio, kvankam tiuj – kondiĉe ke ili estas pravaj – riceveblas male nur per la *negado de la ĝisnuna filozofio*, de la filozofio kiel filozofio. Ni rezervas al ni pli detalan priskribon de tiu partio. Ĝia baza manko resumeblas jene: *Ĝi kredis povi realigi la filozofion sen negi ĝin.*

La kritiko de la *germana ŝtat- kaj jur-filozofio*, kiu ricevis de *Hegelo* sian plej konsekvencon, plej riĉan, lastan version, estas ambaŭ, la kritika analizo de la moderna ŝtato kaj de la realo ligita kun ĝi kaj ankaŭ la decida negado de la tuta ĝisnuna *maniero* de la *germana politika kaj jura konscio*, kies plej nobla, plej universala esprimo levita al *scienco* estas ĝuste la *spekulativa jurfilozofio* mem. Kvankam nur en Germanio povis naskiĝi la spekulativa jurfilozofio, tiu abstrakta transcenda *pensado* de la moderna ŝtato, kies realeco restas en la transejo, eĉ se tiu transejo povas troviĝi nur transe de la rivero Rejno: inverse la *germana* ideo de la moderna ŝtato, en kiu la *reala homo* estis abstraktita, estis ebla nur ĉar kaj en la mezuro laŭ kiu la moderna ŝtato abstraktas la *realan homon* mem aŭ kontentigas la *tutan homon* nur en imaga maniero. La germanoj *pensis* en la politiko tion, kion la aliaj popoloj *faris*. Germanio estis ilia *teoria konscienco*. La abstraktado kaj suprenflugo de ĝia pensado okazis ĉiam sampaŝe kun la unuflankeco kaj subeco de ĝia realo. Se do la *nuna stato de la germana ŝtatsistemo* esprimas la *perfektigon de la malnova reĝimo*, la perfektigon de la splito en la karno de la moderna ŝtato, la *nuna stato* de la *germana ŝtatscio* esprimas la *neperfektecon de la moderna ŝtato*, la difektecon de ĝia karno mem.

Jam kiel decida kontraŭulo de la ĝisnuna speco de la *germana politika konscio* la kritiko de la spekulativa jur-

5 En la originalo: *Voraussetzungen* – hipotezoj, ankaŭ premisoj.
-vl

Karlo MarksoKontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko

filozofio ne disfluas en sin mem, sed en *taskojn*, por kies solvo ekzistas nur unu rimedo: la *praktiko*.

Leviĝas la demando: Ĉu Germanio povas ĝisiri praktikon kiu estas sur la nivelo de la principoj, t.e. *revolucion*, kiu levas ĝin ne nur al la *oficiala nivelo* de la modernaj popoloj, sed al la *homa alteco*, kiu estos la proksima estonteco de tiuj popoloj?

La armilo de la kritiko tamen ne povas anstataŭi la kritikon de la armiloj, la materia forto estas faligenda per materia forto, sed ankaŭ la teorio fariĝas materia forto, ekde kiam ĝi enpenetras la amasojn. La teorio kapablas enpenetri la amasojn, ekde kiam ĝi faras demonstrojn *ĉe la homo*⁶, kaj ĝi faras demonstrojn *ĉe la homo*, ekde kiam ĝi fariĝas radikala. Esti radikala estas kapti la aferon ĉe la radiko. Sed la radiko por la homo estas la homo mem. La evidenta pruvo de la radikalismo de la germana teorio, do de ĝia praktika energio, estas ĝia elirpunkto ĉe la decida *pozitiva* nuligo⁷ de la religio. La kritiko de la religio finiĝas per la instruo, ke la homo estas la plej alta estaĵo por la homo, do kun la kategoria imperativo renversi ĉiujn kondiĉojn, en kiuj la homo estas humiligita, servutigita, forlasita, malestimata estaĵo. Kondiĉoj, kiujn oni ne povas pli bone priskribi ol per la eldiro de franco okaze de projektata imposto por hundoj: Kompatindaj hundoj! Oni volas trakti vin kiel homojn!

Eĉ historie la teoria emancipiĝo havas specife praktikan signifon por Germanio; ĉar la *revolucia* pasinteco de Germanio estas teoria, ĝi estas la *reformacio*. Kiel tiutempe la *monaĥo*, nun estas la *filozofo*, en kies cerbo la revolucio komenciĝas.

Lutero ja venkis la servutecon bazitan sur *devoteco*, sed

6 En la originalo latie (*ad hominem*). - vl

7 En la originalo: *Aufhebung* – nuligo kaj samtempa konserviĝo, en E-o ankaŭ tradukita per *aŭhebo*. -vl

per tio ke li anstataŭigis ĝin per la servuteco bazitan sur *konvinko*. Li rompis la kredon je la aŭtoritato, ĉar li restarigis la aŭtoritaton de la kredo. Li transformis la pastrojn en laikojn, ĉar li transformis la laikojn en pastrojn. Li liberigis la homon el la ekstera religieco, ĉar li faris la religiecon homa interno. Li emancipis la korpon el la kateneno, ĉar li katenigis la koron.

Sed, se la protestantismo ne estis la vera solvo, ĝi estis la vera taskigo. Nun jam ne temis pri la batalo de la laiko kun la *pastro ekster li*, temis pri la batalo kun *sia propra interna pastro*, sia *pastra naturo*. Kaj se la protestanta transformado de la germanaj laikoj en pastrojn emancipis la laikajn papojn, la princojn kune kun ilia klerikaro, privilegiuloj kaj filistroj, tiam la filozofia transformado de la pastraj germanoj en homojn emancipos la *popolon*. Sed, same kiel la emancipiĝo haltis ĉe la princoj, same la *sekularigo* de la havaĵoj ne haltos ĉe la princoj, same la *prirabado de la eklezioj*, kiu estis praktikata precipe de la hipokrita Prusio. Tiutempe la kampula milito fiaskis, la plej radikala fakto de la germana historio, pro la teologio. Hodiaŭ, kiam la teologio mem fiaskis, la plej mallibera fakto de la germana historio, nia nuna stato, rompiĝos kontraŭ la filozofio. Tagon antaŭ la reformacio la oficiala Germanio estis la plej senkondiĉa servisto de Romo. Tagon antaŭ sia revolucio ĝi estas la senkondiĉa servisto de malpli ol Romo: de Prusio kaj Aŭstrio, de kampnobeloj kaj filistroj.

Tamen, al radikala germana revolucio ŝajnas kontraŭstari ĉefa malfacilaĵo.

Nome, la revolucio bezonas *pasivan* elementon, *materian* bazon. La teorio estas en popolo realigata nur ĝis tie, kie ĝi estas la realigo de la popolaj bezonoj. Ĉu la giganta malakordo de la burĝa socio kun la ŝtato kaj kun si mem estos proporcia al la same giganta malakordo inter la postuloj de la germana penso kaj la respondoj de la germana realo? Ĉu

la teoriaj bezonoj estos rekte praktikaj bezonoj? Ne sufiĉas ke la penso serĉas realiĝon, la realo devas mem serĉi la penson.

Sed Germanio ne surgrimpis la mezajn ŝtupojn de la politika emancipiĝo samtempe kun la modernaj popoloj. Eĉ la ŝtupoj, kiujn ĝi teorie superis, ĝi ankoraŭ ne atingis praktike. Kiel ĝi saltu per danĝera salto ne nur trans siajn proprajn barojn, sed samtempe trans la barojn de la modernaj popoloj, trans barojn, kiujn ĝi en la realo devas senti kaj alstrebi kiel liberigo el siaj realaj baroj? Radikala revolucio povas esti nur la revolucio de radikalaj bezonoj, kies premisoj kaj naskejoj ĝuste mankas.

Sed se Germanio akompanis nur per abstrakta agado de pensado la evoluon de la modernaj popoloj, sen partopreni kiel aktiva partio en la realaj bataloj de tiu evoluo, ĝi aliflanke dividis la *suferojn* de tiu evoluo, sen dividi ĝiajn ĝuojn, sen ĝian partan kontentigon. Al la abstrakta agado unuflanke respondas la abstrakta sufero aliflanke. Pro tio, Germanio iun matenon troviĝos sur la nivelo de la eŭropa dekadenco, antaŭ ol esti iam ajn starinta sur la nivelo de la eŭropa emancipiĝo. Oni povos kompari ĝin kun fetiĉisto, kiu pereas pro la malsanoj de la kristanismo.

Se oni konsideras unue la germanajn registarojn, oni konstatas ke ili estas pelataj de la aktualaj cirkonstancoj, de la situacio de Germanio, de la stato de la germana kulturo, fine de la propra feliĉa instinkto, kombini la civilizitajn mankojn de la moderna ŝtatmondo, kies avantaĝojn ni ne posedas, kun la barbaraj mankoj de la malnova reĝimo, kiujn ni ĝuas abunde, tiel ke Germanio devas pli kaj pli partopreni, se ne en la racio, almenaŭ en la malracio ankaŭ de tiuj ŝtatformiĝoj, kiuj iras trans nian nunan staton. Ĉu ekzistas en la mondo ekzemple lando, kiu dividas tiom naive ĉiujn instituciojn de konstitucia ŝtatsistemo, sen dividi ĝiajn realaĵojn, ol la tiel nomata konstitucia Germanio? Aŭ

ĉu ne estis ideo nepre de germana registaro, kombini la turmentojn de la cenzuro kun la turmentoj de la francaj septembraj leĝoj, kiuj premisas la gazetaran liberecon! Kiel oni trovis en la roma Panteono la *diojn* de ĉiuj nacioj, tiel oni trovos en la sankta roma germana imperio la *pekojn* de ĉiuj ŝtatformoj. Ke tiu eklektikismo atingos nivelon ĝis nun ne supozitan, tion garantias nome la *politika-estetika frandemo* de germana reĝo, kiu intencas ludi ĉiujn rolojn de reĝeco, de la feŭda kiel de la burĝa, de la absoluta kiel de la konstitucia, de la aŭtokrata kiel de la demokratia, se ne per la persono de la popolo, tamen almenaŭ per *sia propra persono*, se ne por la popolo, tamen almenaŭ por *si mem*. Germanio – kiel la manko de la *politika estanteco konstituita al propra mondo* – ne povos faligi la specife germanajn barojn sen faligi la ĝeneralan baron de la politika estanteco.

Ne la *radikala* revolucio estas utopia revo por Germanio, ne la *ĝenerale homa* emancipiĝo, sed pli ĝuste la parta, la *nur politika* revolucio, la revolucio, kiu lasas stari la pilierojn de la domo. Sur kio baziĝas parta, nur politika revolucio? Sur tio, ke *parto de la burĝa socio* emancipiĝas kaj akiras la *ĝeneralan* regadon, sur tio, ke certa klaso *el sia aparta situacio* entreprenas la ĝeneralan emancipadon de la socio. Tiu klaso liberigas la tutan socion, sed nur sub la kondiĉo ke la tuta socio troviĝas en la situacio de tiu klaso, do ekz-e posedas aŭ povas laŭdezire akiri monon kaj klerecon.

Neniu klaso de la burĝa socio povas ludi tiun rolon sen naski en si kaj en la amaso elementon de entuziasmo, elementon, en kiu ĝi fratiĝas kun la ĝenerala socio kaj kunfluas kun ĝi, estas kun ĝi konfuzata kaj sentata kaj agnoskata kiel ties *ĝenerala reprezentanto*, elemento, en kiu ĝiaj pretendoj kaj rajtoj estas envere la rajtoj kaj pretendoj de la socio mem, en kiu ĝi estas reale la socia kapo kaj la socia koro. Nur nome de la ĝeneralaj rajtoj de la socio aparta klaso povas postuli la ĝeneralan superregadon. Por sturmi

tiun emancipan pozicion kaj per tio por politika ekspluatado de ĉiuj sferoj de la socio en la intereso de la propra sfero ne sufiĉas nur revolucia energio kaj konscio. Por ke la *revolucio de popolo* kaj la *emancipiĝo de aparta klaso* de la burĝa socio koincidu, por ke unu klaso⁸ estu konsiderata la klaso de la tuta socio, por tio certa klaso devas esti la klaso de la ĝenerala skandalo, la enkorpiĝo de la ĝenerala baro, por tio aparta socia sfero devas esti konsiderata la *famekonata* krimo de la tuta socio, tiel ke la liberigo el tiu sfero aperas kiel la ĝenerala memliberigo. Por ke *unu* klaso estu la *tipa* klaso de la liberigo, por tio inverse alia klaso devas esti la evidenta klaso de subjugado. La negativa ĝenerala signifo de la franca nobelaro kaj de la franca klerikaro kondiĉis la pozitivan ĝeneralan signifon de la *burĝaro*, de la plej najbara kaj kontraŭa klaso.

Sed al ĉiu aparta klaso en Germanio mankas ne nur la konsekvenco, la akreco, la kuraĝo, la rigoreco, kiu povus stampi ĝin la negativa reprezentanto de la socio. Same mankas al ĉiu klaso tiu animlarĝeco, kiu identigas sin kun la popola animo, eĉ se nur dum momento, tiu genieco, kiu entuziasmigas la materian povon al politika povo, tiu revolucia aŭdaco, kiu ĵetas al la kontraŭulo la defian parolon: *Mi estas nenio, kaj mi devus esti ĉio*. Sed la ĉefa provizo de la germana moralo kaj honesteco, ne nur de la individuoj, sed ankaŭ de la klasoj, konsistas el tiu *modesta egoismo*, kiu trudas sian limigitecon kaj lasas ĝin trudi al si. La reciproka situacio de la diversaj sferoj de la germana socio estas do ne drameca, sed eposa. Ĉiu el ili komencas konscii pri si mem kaj meti sin apud la aliajn kun siaj apartaj pretendoj, ne ekde ĝi estas premata, sed ekde, sen ke ĝi iel kontribuis al tio, la cirkonstancoj kreas socian subtavolon, kiun ĝi siavice povas premi. Eĉ la *moralaj sento de la germana meza klaso* baziĝas nur sur la konscio esti la ĝenerala reprezentanto de la filistra mezkvalito de ĉiuj ceteraj klasoj.

8 En la originalo: *Stand* – stato. -vl

Do, ne nur la germanaj reĝoj surtroniĝas en malĝusta tempo, sed ĉiu sfero de la burĝa socio spertas sian malvenkon, antaŭ ol ĝi festis sian venkon, disvolvis sian propran baron, antaŭ ol ĝi superis la baron kiu staras kontraŭ ĝi, trudi sian mallarĝ-animecon, antaŭ ol ĝi povis trudi sian larĝ-animecon, tiel ke eĉ la okazo de granda rolo estas ĉiam pasinta, antaŭ ol ĝi estiĝis, tiel ke ĉiu klaso, ekde kiam ĝi komencas la batalon kontraŭ la klaso super si, estas implikita en la batalon kun la klaso sub ĝi. Pro tio la princoj batalas kontraŭ la reĝoj, la burokrato kontraŭ la nobelaro, la burĝo kontraŭ ĉiuj, dum la proleto jam komencas troviĝi en la batalo kontraŭ la burĝoj. La meza klaso apenaŭ kuraĝas el sia vidpunkto koncepti la penson de emancipiĝo, kiam la evoluo de la sociaj kondiĉoj kaj la progreso de la politika teorio jam deklaras tiun vidpunkton mem arĥaiginta aŭ almenaŭ problemeca.

En Francio sufiĉas, ke iu estu io, por ke li volu esti ĉio. En Germanio oni ne rajtas esti io ajn, se li ne volas rezigni pri ĉio. En Francio la parta emancipiĝo estas la bazo de la universala. En Germanio la universala emancipiĝo estas la nepra kondiĉo de tiu parta. En Francio la realo de la perŝtupa liberigo devas naski la tutan liberecon, en Germanio la maleblo de la perŝtupa liberigo devas fari tion. En Francio ĉiu popolklaso estas *politika idealisto* kaj sentas sin unue ne kiel aparta klaso, sed kiel reprezentanto de la sociaj bezonoj entute. La rolo de la *emancipanto* transiras do laŭvice en drameca moviĝo al la diversaj klasoj de la franca popolo, ĝis ĝi fine atingas tiun klason, kiu realigas la socian liberecon jam ne sub la premiso de certaj kondiĉoj ekster la homoj kaj tamen kreitaj de la homa socio, sed organizas ĉiujn kondiĉojn de la homa ekzistado sub la premiso de la socia libereco. En Germanio, male, kie la praktika vivo estas same senspirita kiel la spirita vivo nepraktika, neniuj klasoj de la burĝa socio havas la bezonon kaj la kapablon de ĝenerala emancipiĝo, ĝis ĝi estas al tio devigata de

sia *rekta* situacio, de la *materia* neceso, de siaj *katenoj* *mem*.

Kie estas do la *pozitiva* ebleco de la germana emancipiĝo?

Respondo: En la formiĝo de klaso kun *radikalaj katenoj*, de klaso de la burĝa socio, kiu ne estas klaso de la burĝa socio, de klaso, kiu estas la dissolvo de ĉiuj klasoj⁹, de sfero, kiu posedas universalan karakteron per siaj universalaj suferoj kaj postulas nenian apartan rajton, ĉar oni faras al ĝi nenian *apartan maljuston*, sed la *ĝeneralan maljuston*, de sfero kiu jam ne povas pretendi je *historia*, sed jam nur je la *homa* titolo, kiu staras en nenia unuflanka kontraŭeco al la konsekvencoj, sed en ĉiuflanka kontraŭeco al la premisoj de la germana ŝtatsistemo, fine de sfero, kiu ne povas emancipiĝi sen emancipiĝi el ĉiuj ceteraj sferoj de la socio kaj per tio emancipi ĉiujn ceterajn sferojn de la socio, kiu estas, per unu vorto, la *kompleta perdo* de la homo, do nur per la *kompleta reakiro de la homo* povas gajni sin mem. Tiu dissolvo de la socio kiel aparta klaso estas la *proletaro*.

La proletaro komencas estiĝi en Germanio nur per la ĉie aperanta *industria* movado, ĉar la proletaron konsistigas ne la *sponte estiĝinta*, sed la *artefarite produktita* malriĉeco, ne la homamaso meĥanike subpremata de la pezo de la socio, sed tiu kiu estiĝas el la *akuta dissolvado* de la socio, precipe el la dissolvado de la meza klaso, kvankam kompreneble ankaŭ la spontaj malriĉuloj kaj la kristan-germanaj servutuloj eniras ĝiajn vicojn.

Se la proletaro anoncas la *dissolvadon de la ĝisnuna mondordo*, tiam ĝi elparolas nur la *sekreton de sia propra ekzistado*, ĉar ĝi estas la *fakta* dissolvado de tiu mondordo. Se la proletaro postulas la *negacion de la privata proprieto*, tiam ĝi levas nur al *principo de la socio* tion, kion la socio levis al *sia* principo, kiu *en la proletaro* jam sen ĝia kontri-

9 En la originalo: *Stand ... Stände* – stato ... statoj. -vl

buo estas enkorpiĝinta kiel negativa rezulto de la socio. La proleto troviĝas tiam koncerne la estiĝanta mondo en la sama rajto, en kiu la *germana reĝo* troviĝas koncerne la estiĝintan mondon, kiam li nomas la popolon *sia* popolo kiel la ĉevalon *sia* ĉevalo. La reĝo, per tio ke li deklaras la popolon *sia* proprieto, nur elparolas, ke la privata proprieto estas reĝo.

Kiel la filozofio trovas en la proletaro siajn *materiajn* armilojn, tiel la proletaro en la filozofio siajn *spiritajn* armilojn, kaj ekde kiam la fulmo de la penso ĝisfunde enfalis en tiun naivan popolgrundon, plenumiĝos la emancipiĝo de la *germanoj* al *homoj*.

Ni resumu la rezulton:

La sole *praktike* ebla liberigo de Germanio estas la liberigo el la vidpunkto de *tiu* teorio, kiu deklaras la homon la plej alta estaĵo de la homoj. En Germanio la emancipiĝo el la *mezepoko* eblas nur kiel la emancipiĝo samtempe de la *partaj* superadoj de la mezepoko. En Germanio *nenia* speco de servuto rompeblas sen rompi *ĉian* specon de servuto. La *ĝisfundema* Germanio ne povas revolucii sen revolucii *ĝisfunde*. La *emancipiĝo de la germano* estas la *emancipiĝo de la homo*. La kapo de tiu emancipiĝo estas la *filozofio*, ĝia koro la *proletaro*. La *filozofio* ne povas *realiĝi* sen *dissolvo de la proletaro*, la *proletaro* ne povas *dissolviĝi* sen la *realigo de la filozofio*.

Kiam ĉiuj internaj kondiĉoj estos plenumitaj, tiam anonciĝos la *germana tago de resurekto* per la *trumpetado de la gaŭla koko*.

Jozefo Ŝlejfŝtejno pri tiu ĉi verko de Markso

Jozefo Ŝlejfŝtejno, en sia verko „Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino”¹, skribas pri la estiĝo de la marka „Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio” kaj pri la jaron poste verkita „Enkonduko”. Jen tiu parto de lia teksto.

Antaŭ ol transloĝiĝi en oktobro 1843 al Parizo, Markso (post edziĝi al Jenny von Westphalen en somero 1843 en *Kreuznach*), nun multe pli ĝisfunde kaj profunde okupiĝas pri la hegela jurfilozofio, pri kies bazoj li unue ekdubis kiam li, [...] en la *Rejna Gazeto* kontaktiĝis kun ekonomiaj demandoj.

Temas pri „*Kritik des Hegelschen Staatsrechts* §§ 261 bis 313 [Kritiko de la hegela ŝtatjuro §§ 261 ĝis 313]”, manuskripto unue eldonita en 1927 de la Instituto Markso-Engelso-Lenino de Moskvo, en kiu Markso etendas la metodon de la Hegel-kritiko uzita de Fojerbaĥo nun ankaŭ al la *ŝtato* kaj la *politiko*. Ĝus antaŭe aperis de Fojerbaĥo la „*Vorläufige Thesen zur Reform der Philosophie* [Provizoraj tezoj pri la reformado de la filozofio]” kaj liaj „*Grundsätze der Philosophie der Zukunft* [Principoj de la filozofio de la estonteco]”, Markso akceptis ilin entuziasme. Sed en la direkto, en kiu li mem estis plej progresinta, ili jam ne sufiĉis al li. Tiel li skribas en marto de 1843 al Arnold Ruge:

„La fojerbahaj aforismoj nur en tiu sola punkto ne plaĉas al mi, ke li indikas tro la naturon kaj maltro la politikon. Sed tio estas la sola alianco per kiu la nuna filozofio povas fariĝi vero. Sed verŝajne okazos kiel en la 16-a jarcento, kiam al la natur-entuziasmoj respondis alia serio de ŝtat-entuziasmoj.”²

La evidenta progreso trans Fojerbaĥo estas ĉi tie *politika* kaj ĝerme ankaŭ jam *ekonomia*. Metode Markso emfazas –

1 Jozefo Ŝlejfŝtejno: *Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino*, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4, p. 24-31. La germana origilalo: *Josef Schleifstein: Einführung in das Studium von Marx, Engels und Lenin. Neue Impulse Verlag*, 2008. -vl

2 Marx an A. Ruge [Markso al Ruge], MEW, vol. 27, p. 417.

kun Fojerbaĥo, kontraŭ Hegelo – ke tiu faras ĉie la ideon subjekto, sed la veran subjekton predikato. Ne la logiko de la afero, sed la afero de la logiko estas ĉe li la filozofia punkto; ke la logiko servas ne kiel pruvo de la ŝtato, sed la ŝtato kiel pruvo de la logiko.

„Tio estas la duismo, ke Hegelo ne konsideras la ĝeneralon la reala esenco de la realo-finito, t.e. de la ekzistanto, de la determinito, aŭ la realan eston ne la *vera subjekto* de la nefinito.”³

La aplikado de la materiisma perceptmaniero al sociaj fenomenoj estas ĉi tie jam evidenta, sed Markso iras ankoraŭ pli antaŭen en la *politikaj* eldiroj, per tio ke li faras revoluciajn konkludojn celantajn al la popola suvereneco kaj al *reala demokratio*.

„Hegelo eliras de la ŝtato”, skribas Markso, „kaj faras la homon subjektigita ŝtato; la demokratio eliras de la homoj kaj faras la ŝtaton objektigita homo ... La homo ekzistas ne pro la leĝo, sed la leĝo ekzistas pro la homo, ĝi estas *homa esto*, dum en la aliaj la homo estas la *leĝa esto*. Jen la baza diferenco de la demokratio. Ĉiuj ceteraj *ŝtatformiĝoj* estas certa, difinita, *aparta ŝtatformo*. En la demokratio la *formala* principo estas samtempe la *materia* principo.”⁴

Estas evidente, ke Markso ĉi tie ankoraŭ ne konceptas la anatomion de la burĝa klasstrukturo en ties konkreta, soci-ekonomie kondiĉita klasstrukturo kaj en ĝiaj klasaj kontraŭecoj. Sed li jam esprimas ke oni devas serĉi en la burĝa socio, ĉar ĝi estas la sfero de la *materiaj* interesoj, la veran sekreton de la socia vivo. Kaj li do skribas 1859 retrorigarde en la antaŭparolo al la „Kritiko de la politika ekonomio” pri tiu fazo de sia spirita evoluo:

„Mia esplorado kondukis al la rezulto ke la juraj rilatoj kiel ŝtatformoj kompreneblas nek el si mem nek el la tiel nomata evoluo de la homa spirito, sed ke ili radikas pli ĝuste en la

3 Karl Marx: Kritik des Hegel'schen Staatsrechts [Karlo Markso: Kritiko de la hegela ŝtatjuro], MEW, vol. 1, p. 224-225.

4 Saml., p. 231.

materiaj vivkondiĉoj, kies tutaĵon Hegelo, laŭ la modelo de la angloj kaj francoj de la 18-a jarcento, kunigas sub la nomon 'burĝa socio', sed ke la anatomio de la burĝa socio serĉendas en la politika ekonomio.”⁵

En la laboraĵoj verkitaj jam en Parizo inter la aŭtuno 1843 kaj januaro 1844, kiuj aperis 1844 en la sola kajero de la kune kun Ruge eldonitaj '*Germanaj-francaj jarlibroj*', Markso troviĝas ankoraŭ *antaŭ* tiuj ekonomiaj esploradoj. Sed sub la influo de la pariza politika kaj socia vivo, de la renkontiĝo kun francaj socialistoj kaj laborist-komunistoj, la profunda ŝanĝiĝo de Markso al *materiisto* kaj *komunisto* fariĝas videbla en tiuj pense kiel arte geniaj junec-laboraĵoj („Pri la juda demando [*Zur Judenfrage*]” kaj „*Zur Kritik der Hegelschen Rechtsphilosophie, Einleitung* [Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio, enkonduko]”).

Markso profundigas sian propran kritikon de la hegela jurfilozofio kaj ankaŭ – en la disputo kun la junhegelaneco de Bruno Bauer – la religikritikon de Fojerbaĥo. Sed krome liaj praktikaj politikaj konkludoj fariĝas multe pli realecaj. Ili ricevas por la unua fojo rektan rilaton kun la moderna industri-proletaro kiel tiu socia forto kun kiu la revolucia filozofio devas ligiĝi, se ĝi volas realigi siajn ideojn.

En la eseo *Pri la juda demando* Markso jam konceptas la radikalan demokration ne abstrakte. Li fondas sian kritikan starpunkton al ĉia burĝa demokratio kaj al ties formala, ŝajna karaktero, per tio ke li reiras al la *ekonomiaj* rilatoj sur kiuj ĝi baziĝas. Per tio li montras, ke gardado kaj protekto de la burĝa privata proprieto estas ankaŭ la vera celo de la hom- kaj civitan-raĵtoj anoncitaj de la franca revolucio kaj la sekreto de la burĝa libereco.

Markso skribas:

„La praktika aplikado de la *homraĵo je libereco* estas la hom-

5 Karlo Markso: Antaŭparolo 'Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio', tiu ĉi libro, p. 32

rajto je privata proprieto. En kio konsistas la homrajto je privata proprieto? ... La homrajto je privata proprieto estas do la rajto, arbitre (à son gré), sen rilato al aliaj homoj, sendepende de la socio, ĝui sian havaĵon kaj disponi pri ĝi, la rajto je egoismo⁶ Tiu individua libereco, kiel ties praktika aplikado, konsistigas la bazon de la burĝa socio ... Neniu el la tiel nomataj homrajtoj iras do trans la tiel nomatan egoisman homon, trans tiun homon, kiu estas membro de la burĝa socio, nome retirita al si, al sia privata intereso kaj al sia privata arbitreco kaj apartigita de la komunumo."⁷

La burĝa revolucio, la politika, diras Markso por distingi ĝin de la socia, dissolvas la civitanan vivon en ĝiajn erojn, sen revoluciigi ilin, ĝi ne kondukas al la emancipiĝo de la homo:

„La homo estis pro tio ne liberigita el la religio, li ricevis la liberecon je religio. Li ne estis liberigita el la proprieto. Li ricevis la liberecon je proprieto. Li ne estis liberigita el la egoismo de la metio, li ricevis la liberecon praktiki metion aŭ industrion.”⁸ Markso konkludas: „Ĉia emancipiĝo estas rekonduko de la homa mondo, de la rilatoj al la homo mem ... nur kiam la homo ekkonis kaj organizis siajn proprajn fortojn kiel sociajn fortojn kaj pro tio jam ne disigas de si la socian forton en la formo de politika forto, nur tiam la homa emancipiĝo okazis.”⁹

En la „*Enkonduko al 'Kontribuaĵo al la kritiko de la hege-la jurfilozofio'*”, verkita mallonge poste, Markso kondukas tiujn pensojn ankoraŭ esencan pecon pli antaŭen. Tie la rekta influo de la politika vivo en Parizo kaj lia unua rilato kun la praktika laborista movado fariĝas ankoraŭ pli palp-ebla. Tio veras pri la religikritiko kaj ankaŭ pri la kritiko de

6 En la originalo: *Recht auf Eigennutz* („rajto je egoismo / profito” -vl

7 Karlo Markso: Pri la juda demando, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, 49p, ISBN 978-2-918300-33-5, p. 37.

8 Saml., p. 369.

9 Saml.

la germanaj sociaj-politikaj kondiĉoj, sed speciale pri la prijuĝado de la pozicio de la proletaro en la burĝa socio kaj pri lia propra rilato al la proletaro, pri la reciprokaj rilatoj de ekonomio kaj politiko (bazo kaj superstrukturo, kiel Markso poste diris) kaj pri la rekte komunistaj – kvankam ankoraŭ tre abstrakte konceptitaj – konkludoj, kiujn li faras el ĉio ĉi.

Markso deiras ĉi tie ankoraŭ el la ideo, ke la *kondiĉo* de ĉia kritiko – sed tion oni komprenu jam pli historie ol laŭ la fakto – estas la *kritiko de la religio*. Li konsentas kun Fojerbaĥo: „*La homo faras la religion, la religio ne faras la homon.*”¹⁰ Sed al li jam ne sufiĉas la fojerbaha abstraktaĵo „*la homo*”. Li demandas plu, kio estas la homo, kaj respondas: „*Sed la homo, tio ne estas abstrakta estaĵo ekster la mondo. La homo, tio estas la mondo de la homo, ŝtato, socio.*”¹¹ Malsame ol Fojerbaĥo Markso esploras por la unua fojo pri la konkreta socia origino de la religio kaj daŭrigas.

„Tiu ŝtato, tiu socio produktas la religion, *inversan mondkonscion*, ĉar ili estas *inversa mondo*” ... La religio „estas la *fantasta realigo* de la homa estaĵo, ĉar la homa estaĵo ne havas veran realecon. La batalo kontraŭ la religio estas do rekte la batalo kontraŭ tiu mondo, kies spirita *aromo* estas la religio.”¹²

Eble nur asociiĝe aludanta teksteron en la „*Esenco de la kristanismo*” de Fojerbaĥo (tiu tekstero: „*Dio estas larmo de amo, verŝita en profunda kaŝiteco pri la homa mizero. Dio estas neelparolebla suspiro, kuŝanta sur la fundo de la animoj – tiu eldiro estas la plej notinda, plej profunda, plej vera eldiro de la kristanaj mistikuloj*”¹³), sed donante al tiu tekstero siavice pli profundan esprimon kiu rekte rilatas la

10 Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; ĉi tie p. 6.

11 Saml.

12 Saml., p. 7.

13 Ludwig Feuerbach: Wesen des Christentums [Ludoviko Fojerbaĥo: Esenco de la kristanismo], p. 201.

socion kaj la soci-politikan praktikon, Markso poste daŭrigas:

„La *religia* mizero estas samtempe la esprimo de la reala mizero kaj la protesto kontraŭ la reala mizero. La religio estas la suspiro de la premata kreitaĵo, la animo de senkora mondo, kiel ĝi estas la spirito de senspiritaj kondiĉoj. Ĝi estas la *opio* de la popolo.

La nuligo de la religio kiel la *iluzia* feliĉo de la popolo estas la postulo de ĝia *real*a feliĉo. La postulo rezigni la iluziojn pri sia situacio estas la *postulo rezigni situacion kiu bezonas iluziojn*. La kritiko de la religio estas do *ĝerme la kritiko de la mizerejo*, kies *glorkrono* estas la religio. ... La kritiko de la mizerejo transformiĝas per tio en la kritikon de la Tero, la *kritiko de la religio* en la *kritikon de la juro*, la *kritiko de la teologio* en la *kritikon de la politiko*.“¹⁴

Markso transiris poste al la kritiko de tiu „*tera mizerejo*“ en ĝia tiama germana formo kaj diris ke la germanoj „*dividis la restaŭraciojn de la modernaj popoloj sen dividi iliajn revoluciojn*“, kaj ke ili troviĝis ĉiam nur unufoje „*en la socio de libereco*“, „*dum la tago de ties enterigo*“. Oni devas, diris Markso, „igi la realan premon ankoraŭ pli prema, per tio ke oni aldonu al ĝi la konscion de la premo“, oni devas „*dancigi la ŝtoniĝintajn kondiĉojn per tio ke oni antaŭkantas al ili ilian propran melodion*“.¹⁵

Post kiam Markso ankoraŭ en septembro 1843 skribis al Arnold Ruge, ke jam ne estas duboj pri la „*de kie*“, sed des pli da konfuzo pri la „*kien*“, kaj ke ĉiu el la 'reformistoj' devas konfesi al si ke li ne havas precizan ideon pri tio kio devas estiĝi¹⁶, Markso trovis por si *klaran* celon. La demando estas, diras li, ĉu Germanio povas veni al revolucio kiu

14 Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; ĉi tie p. 7.

15 Saml., p. 10.

16 Citita en Auguste Cornu: Karl Marx und Friedrich Engels, vol. 1, p. 365.

levas ĝin ne nur al la *oficiala nivelo* de la modernaj popoloj, sed al la *homa alteco*, kiu estos la venonta estonteco de tiuj popoloj. La armilo de la kritiko tamen ne povas anstataŭi la kritikon de la armiloj, materia forto faligendas per materia forto, sed ankaŭ la teorio fariĝas „*materia forto ekde kiam ĝi kaptas la amasojn*”. Esti radikala signifas kapti la aferon ĉe la radiko. Sed la radiko por la homo estas la homo mem.

„La kritiko de la religio”, daŭrigas Markso, „finiĝas kun la instruo ke la homo estas la plej alta estaĵo por la homo, do kun la kategoria imperativo renversi ĉiujn sociajn kondiĉojn en kiuj la homo estas humiligita, servutigita, forlasita, malestimata estaĵo ...”¹⁷

Al germana revolucio ŝajnas kontraŭstari ĉefa malfacilaĵo, diras li, ĉar revolucioj bezonas *masivan* elementon, materialan bazon. Ne sufiĉas ke la penso premas al realiĝo, la realeco devas premiĝi al la penso. Tiun „materialan bazon”, tiun realecon Markso vidas nun unuafoje en la *proletaro*, en tio ke la moderna socio formis klason kiu

„per siaj universalaj suferoj posedas universalan karakteron, al kiu oni faras ne *apartan* maljustaĵon, sed la maljustaĵon ĝenerale”.

Ĉar ties situacio estas „*la kompleta perdo de la homo*”, ĝia emancipiĝo estas „*la kompleta reakiro de la homo*”. Markso konkludas:

„La *emancipiĝo de la germano* estas la *emancipiĝo de la homo*. La kapo de tiu emancipiĝo estas la filozofio, ĝia koro la proletaro. La filozofio ne povas realiĝi sen la dissolviĝo de la proletaro, la proletaro ne povas dissolviĝi¹⁸ sen la realiĝo de la filozofio.”¹⁹

17 Karlo Markso, Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio, Enkonduko, ĉi tie, p. 15.

18 En la originalo: *Aufhebung ... aufheben* – dissolviĝo ... dissolviĝi, aŭ: nuliĝo ... nuliĝi (esprimoj de la hegela dialektiko). -vl

19 Saml., p. 22.

La ĝermoj de historia-materiisma mondpercepto aperas en tiuj laboraĵoj ankoraŭ grandparte sen konkreta soci-ekonomia fondado, kaj la koncepto de la revolucia historia rolo de la proletaro ankoraŭ ne estas derivita el la ĉioma evoluo de la kapitalisma produktadmaniero. Sed la progreso en tiu direkto evidentas. Tamen la plej grava spirita impulso por Markso venas nun, cetere en la sama kajero de la Germanaj-francaj Jarlibroj, de Frederiko Engelso, nome la emo pli profunde studi la *ekonomiajn* kondiĉojn.

Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio

Antaŭparolo

Tradukita laŭ Karl Marx/Friedrich Engels: Werke [MEW], (Karl) Dietz Verlag, Berlino, volumo 13, 7-a eldono 1971, senŝanĝa re-presado de la 1-a eldono 1961, Berlino (GDR), p. 7-11, en la reta versio http://www.mlwerke.de/me/me13/me13_003.htm

Mi konsideras la sistemon de la burĝa ekonomio en jena vico: *kapitalo, grundproprieto, dunglaboro; ŝtato, ekstera komerco, mondkomercato*. Sub la tri unuaj rubrikoj mi esploras la ekonomiajn vivkondiĉojn de la tri grandaj klasoj, en kiuj la moderna burĝa socio estas dividita; la kunligiteco de la tri aliaj rubrikoj evidentas. La unua sekcio de la unua libro, kiu traktas pri la kapitalo, konsistas el jenaj ĉapitroj: 1-e la varo; 2-e la mono aŭ la simpla cirkulado; 3-a la kapitalo ĝenerale. La du unuaj ĉapitroj konsistigas la enhavon de tiu ĉi kajero. La tuta materialo kuŝas antaŭ mi en formo de monografioj, kiuj estis verkitaj, en tre disaj periodoj, por propra klariĝo, ne por presado, kaj kies sistema prilaborado laŭ la indikita plano dependos de eksteraj cirkonstancoj.

Mi ne transprenos ĝeneralan enkondukon, kiun mi estis konceptinta, ĉar post pripensado, ĉia anticipado de ankoraŭ pruwendaj rezultoj ŝajnas al mi ĝena, kaj la leganto, kiu entute volas sekvi min, devas decidi leviĝi de la detala al la ĝenerala. Aliflanke, kelkaj indikoj pri la vojo de miaj propraj politikaj-ekonomiaj studoj povas ĉi tie trovi sian lokon.

Mia fakstudado estis tiu de juro, kiun mi tamen studis nur kiel subordigitan fakon apud filozofio kaj historio. En la jaro 1842-1843, kiel redaktisto de la *Rejna Gazeto*¹, mi troviĝis por la unua fojo en la embarasa situacio devi eldiri mian opinion pri la tiel nomataj materiaj intereso. La diskutoj de la rejna parlamento² pri la lignoŝteloj kaj la dispartigo de la grundproprieto, la oficiala polemiko kiun s-ro

1 En la originalo: „Rheinische Zeitung”. -vl

2 En la originalo: „Landtag”. -vl

von Schaper, la tiama prezidanto de la rejnlanda provinco, lanĉis kun la *Rejna Gazeto* pri la kondiĉoj de la mozelaj kampkulturistoj, fine la debatoj pri liberkomerco kaj protektdoganaĵo, donis la unuajn okazojn al mi okupiĝi pri ekonomiaj demandoj. Aliflanke en tiu tempo, kiam la bona volo 'iri pli antaŭen' ofte samvaloris kiel kono de la faktoj, en la *Rejna Gazeto* aŭdiĝis iomete filozofie nuancita eĥo de la francaj socialismo kaj komunismo. Mi deklaris min kontraŭ tiu fuŝado, sed samtempe en disputo kun la *Ĝenerala Aŭgsburga Gazeto*³ mi senhezite konfesis ke miaj ĝisnunaj studoj ne permesas al mi la kuraĝon fari ian ajn juĝon pri la francaj tendencoj mem. Male, mi avide kaptis la okazon kiun donis al mi la iluzio de la mastrumantoj de la *Rejna Gazeto*, kiuj kredis povi per pli milda sinteno de la gazeto nuligi la mortkondamnon deciditan por ĝi, por retiriĝi el la publika scenejo en la studĉambron.

La unua laboro, kiun mi faris por solvi la dubojn kiuj atakis min, estis kritika reviziado de la hegela jurfilozofio, laboro, el kiu aperis la Enkonduko en la *Germanaj-Francaj Jarlibroj*⁴ eldonitaj 1844 en Parizo. Mia esplorado kondukis al la rezulto ke jurrilatoj kaj ŝtatformoj kompreneblas ne el si mem nek el la tiel nomata ĝenerala evoluo de la homa spirito, sed male radikas en la materiaj vivkondiĉoj, kies tutaĵon Hegelo, laŭ la angloj kaj francoj de la 18-a jarcento, nomas „burĝa socio”, kaj ke la anatomio de la burĝa socio siavice serĉendas en la politika ekonomio. Ties esploradon, kiun mi komencis en Parizo, mi daŭrigis en Bruselo, post elmigri tien pro elpel-ordono de s-ro Guizot. La ĝenerala rezulto, kiun mi akiris kaj kiu, akirita, servis al mi kiel gvidlinio por miaj studoj, mallonge resumeblas jene: En la socia produktado de sia vivo la homoj eniras certajn, necesajn, de sia volo sendependajn rilatojn, produktadrilatojn, kiuj kongruas kun certa evoluŝtupo de siaj produktadfortoj.

3 En la originalo: *Allgemeine Augsburger Zeitung*. -vl

4 En la originalo: *Deutsch-Französische Jahrbücher*. -vl

La tutaĵo de tiuj produktadrilatoj konsistigas la ekonomian strukturon de la socio, la realan bazon, sur kiu leviĝas jura kaj politika superstrukturo kaj al kiu kongruas certaj sociaj formoj de konscio. La produktadmaniero de la materia vivo kondiĉas la socian, politikan kaj spiritan vivprocezon entute. Ne estas la konscio de la homoj kiu determinas ilian eston, sed inverse ilia socia esto kiu determinas ilian konscion. Sur certa ŝtupo de sia evoluo la materiaj produktadfortoj de la socio eniras en kontraŭdiron kun la ekzistantaj produktadrilatoj aŭ, kio estas nur jura esprimo por tio, kun la proprietrilatoj, ene de kiuj ili ĝise moviĝis. El evoluformoj de la produktadfortoj tiuj rilatoj fariĝas iliaj malhelpoj. Tiam komenciĝas epoko de socia revolucio. Kun la revolucio de la ekonomia bazo la tuta superstrukturo pli aŭ malpli rapide revoluciĝas. En la rigardo al tiaj ŝanĝegoj oni devas ĉiam distingi inter la materiaj, naturscience fidele konstatebla revolucio en la ekonomiaj produktadkondiĉoj kaj la juraj, politikaj, religiaj, artaj aŭ filozofiaj, mallonge, ideologiaj formoj, en kiuj la homoj konsciiĝas pri tiu konflikto kaj elbatalas ĝin. Kiel oni ne prijuĝas tion, kio estas individuo, laŭ tio, kion ĝi mem opinias esti, same oni ne povas prijuĝi tian revolucian epokon laŭ laŭ ĝia konscio, sed devas klarigi tiun konscion el la kontraŭdiroj de la materia vivo, el la ekzistanta konflikto inter la sociaj produktadfortoj kaj produktadkondiĉoj. Socia formacio neniam pereas antaŭ ol ĉiuj produktadfortoj estas disvolvitaĵoj por kiuj ĝi estas sufiĉe vasta, kaj novaj pli altaj produktadkondiĉoj neniam anstataŭas ĝin antaŭ ol ĝiaj materiaj ekzistadkondiĉoj estas elkovitaĵoj en la sino de la malnova socio mem. Pro tio la homaro donas al si ĉiam nur taskojn kiujn ĝi povas solvi, ĉar ĉe pli detala rigardo oni ĉiam trovas ke la tasko mem estiĝas nur kie la materiaj kondiĉoj de ĝia plenumado jam ekzistas aŭ almenaŭ estas estiĝantaj. En vastaj konturoj la azia, antikva, feŭda kaj moderne burĝa produktadmanieroj nomeblas progresemaĵoj epokoj de la ekonomia sociformacio. La burĝaj produktadkondiĉoj

estas la lasta antagonisma formo de la socia produktadprocezo, antagonisma ne en la senco de individua antagonismo, sed en la senco de antagonismo elkreskanta el la sociaj vivkondiĉoj de la individuoj, sed la produktadfortoj evoluantaj en la sino de la burĝa socio kreas samtempe la materiajn kondiĉojn por solvi tiun antagonismon. Pro tio, kun tiu socia formacio la antaŭhistorio de la homa socio finiĝas.

Frederiko Engelso, kun kiu mi ekde la apero de lia genia skizo pri la kritiko de la ekonomiaj kategorioj (en la *Germanaj-Francaj Jarlibroj*) flegis konstantan skriban ide-interŝanĝon, estis atinginta kun mi la saman rezulton sur alia vojo (komparu lian *Situacio de la laboranta klaso en Anglio*⁵, kaj kiam li en la printempo de 1845 ankaŭ ekloĝis en Bruselo, ni decidis komune ellabori la kontraŭecon de nia vidmaniero al tiu de la germana filozofio, fakte finbilanci nian antaŭan filozofian konsciencon. La intenco estis plenumita en formo de kritiko de la posthegela filozofio. La manuskripto⁶, du fortaj oktav-volumoj, jam delonge estis en sia eldonejo en Vestfalia, kiam ni ricevis la mesaĝon, ke ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj ne permesas la presadon. Ni lasis la manuskripton al la ronĝanta kritiko de la musoj des pli volonte, ĉar ni estis atingintaj nian ĉefan celon – memkompreniĝon. El la disaj laboraĵoj, per kiuj ni tiam prezentis al la publiko niajn ideojn, mi mencias nur tiun de Engelso kaj mi komune verkitan *Manifesto de la Komunista Partio* kaj de mi publikigitan *Discours sur le libre échange* [Parolado pri la liberkomerco⁷]. La decidaj punktoj de nia vidmaniero estis por la unua fojo science, eĉ se nur polemike, skizitaj

5 Friedrich Engels: Die Lage der arbeitenden Klasse in England, MEW, vol. 2, p. 225-506.

6 Die deutsche Ideologie [La germana ideologio], MEW, vol. 3, p. 5-530.

7 Karlo Markso: Parolado pri la demando de liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009 ISBN 978-2-918300-02-1

en mia skribaĵo eldonita en 1847 direktita kontraŭ Prudono *Misère de la philosophie ktp*⁸. La presado de germane verkita eseo pri la dunglaboro⁹, en kiu mi kunplektis miajn prelegojn, kiujn mi estis farintaj en la brusela Germana Laborist-Asocio¹⁰ estis interrompita de la februara revolucio kaj de mia elpelo el Belgio sekve al tiu.

La eldonado de la *Nova Rejna Gazeto*¹¹ 1848 kaj 1849 kaj la postaj okazaĵoj interrompis miajn ekonomiajn studojn, kiujn mi povis daŭrigi nur en la jaro 1850 en Londono. La giganta materialo por historio de la politika ekonomio, kiu estas amasigita en la Brita Muzeo¹², la favora starpunkto, kiun Londono ebligas por la observado de la burĝa socio, fine la nova evolustadio, en kiu la lasta ŝajnis eniri kun la malkovro de la kalifornia kaj aŭstralia oro, decidigis min tute rekomenci kaj kritike tralabori la novan materialon. Tiuj studoj kondukis parte per si mem en ŝajne tute ekster-temaj fakoj, en kiuj mi devis pli aŭ malpli longe resti. Sed la tempo, pri kiu mi disponis, estis ĉefe mallongigata de la nepra neceso fari vivtenan laboron. Mia nun okjara kunlaborado ĉe la unua angla-usona gazeto, la New York Tribune¹³, devigis min al eksterordinara displitado de la studoj, ĉar mi okupiĝas nur esceptokaze pri gazetara korespondado. Tamen, la artikoloj pri notindaj ekonomiaj

8 Karlo Markso: La mizero de la filozofio. Respondo al Prudono: „La filozofio de la mizero”. Kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj de Henri Mougin. Pri J. P. Prudono (Letero al J. B. v. Schweitzer). Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009, ISBN 978-2-918300-08-3

9 Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009, ISBN 978-2-918300-00-7

10 En la originalo: „im Brüsseler Deutschen Arbeiterverein”. -vl

11 En la originalo: „Neue Rheinische Zeitung”. -vl

12 En la originalo: „British Museum”. -vl

13 En la originalo: „New-York Tribune”. -vl

Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomioAntaŭparolo

okazaĵoj en Anglio kaj sur la kontinento konsistigis tiom gravan parton de miaj kontribuaĵoj, ke mi estis devigata familiariĝi kun praktikaj detaloj kiuj troviĝas ekster la kampo de la propradira scienco de politika ekonomio.

Per tiu ĉi skizo pri la evoluo de miaj studoj en la kampo de la politika ekonomio mi volis nur montri, ke miaj opinioj, kiel ajn oni povas prijuĝi ilin kaj kiom malmulte ili kongruas kun la interesitaj antaŭjuĝoj de la regantaj klasoj, estas la rezulto de konscienca kaj longjara esplorado. Sed ĉe la eniro en la sciencon, kiel ĉe la eniro en la inferon, oni devas postuli:

Qui si convien lasciare ogni sospetto
Ogni viltà convien che qui sia morta.

[Ĉi tie vi devas forlasi ĉian suspekton,
Ĉi tie ajna timemo jam ne decas.]

(Danto: Dia komedio)

Londono, en januaro 1859

Karlo Markso

Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) volas ne nur legi, sed ankaŭ diskti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro „*Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...*”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

1. – C. F. Ramuz: Aline (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

2. – Arturo Ŝnicio: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝnicio de Hartmut Scheible, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

3. – Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

4. – Kubaj infanrakontoj, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, MAS, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

5. – GBEGLO Koffi: Esperantujismo, MAS, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

6. – Johano Besada: Eseoj, MAS, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

7. – Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

8. – Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, MAS, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

9. – Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949, elfrancigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

10. – Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj – trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

11. – Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

12. – Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

13. – Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-21-2

14. – Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo, MAS, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

15. – Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

16. – Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj. François Jullien: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; Manfred Szameitat: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Jian Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Rolf Berthold: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

17. – Karlo Markso: La mizero de la filozofio, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero“; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono.** Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

18. – Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1, Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, Horst Hensel: La nomoj de la mono – kontribuado al karakterizo de la nuna kapitalismo, Harald Werner: Notoj pri la psikologio de la krizo, Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmastrumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

19. – Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo, Howard Zinn: La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, **Noam Chomsky:** Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, **William Blum:** La nepardonebla revolucio, **Michael Parenti:** Agreso kaj propagando kontraŭ Kubo, **Piero Glejeses:** Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, **Ignacio Ramonet:** Miamo, nesto de teroristoj, **Salim Lamrani:** La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, **Leonard Weinglass :** La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, **Wayne Smith:** Trista paĝo en la historio de usona juro, **Saul Landau:** Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, **Michael S. Smith:** Raporto pri du procesoj, **James Petras:** La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, **Jitendra Sharma:** Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, **Ricardo Alarcón de Quesada:** La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, **Gianni Miná:** Historio kiun la amas-komunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, **Nadine Gordimer:** La homaro kiel reflektado de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, MAS, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

20. – Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolan0-11-3do-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, MAS, 2009, 91 p., ISBN 978-2-91830

21. – Oktobra Revolucio kaj la sekvoj. Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovet socio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

22. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2, Joachim Bischoff: La financkrizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Lauermann: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

23. – La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj. Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marka antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potenc-reproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsiĥosocia unuo homo – kognita cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

24. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7

25. – Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo

Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

26. – Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

27. – Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto“, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-19-9

28. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3 (2010), Werner Seppmann: Riskokapitalismo; Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon; Christina Kaindl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomia krizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

29. – Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emanciphorizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso“ ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭe; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo? Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

30. – Adjévi ADJE: El togolanda saĝosako, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-20-5

31. – Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)

32. – Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-24-3

33. – Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

34. – Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1

35. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj deka ĝis dektria, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4

36. – Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la CO₂-diskuto; Karl Hermann Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okaziĝo; raportoj, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN

37. – Georgo Pleĥanov: Pri rolo de la persono en la historio, El la

rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 57 p., ISBN 978-2-918300-36-6.

38. – Karlo Markso: Pri la juda demando, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8

39. – Eddy Raats: Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2

40. – Adebayo AFOLARANMI: Ronke, la ĵaluzulino, MAS, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9

41. – Jozefo Ŝlejŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4

42. – Ivan Efremov: La Horo de Bovo. Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3

43. – Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo. Kun teksto de Jozefo Ŝlejŝtejno. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0 (tiu ĉi libro).

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Iliaj tekstoj estas libere elŝuteblaj por membroj de MAS.

Karlo Markso:
Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio.
Enkonduko;
Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio.
Antaŭparolo

Monda Asembleo Socia (MAS)
2010
ISBN 978-2-918300-38-0

enpaĝigita de MAS
per OpenOffice 3.1.1, litertiparo DejaVu Serif 10 kaj 9 pt
sub Mandriva Linukso 2010

presita en Germanio en la jaro 2010